********************************************************************************
**INSTRU-CIRKULERO 2014/junio**
Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj
********************************************************************************

Karaj Gekolegoj,

Per tiu ĉi cirkulero ni ŝatus informi vin pri kelkaj novaĵoj post nia ĉi-jara jarĉefkunsido kaj aldone vi ricevas la jarraporton, kiu estis sendita al ILEI. En ĝi mi provis mallonge raporti pri eventoj en la lasta jaro, pri lerneja kaj eksterlerneja Esperanto-instruado kaj pri internaciaj agadoj ekz. enkadre de eŭropaj projektoj.
Vi povas legi ankaŭ pri kelkaj baldaŭaj eventoj, planoj.

**1. Jarĉefkunveno 2014**
La jarĉefkunveno de AGEI okazis la 7-an de junio en Erfurt, laŭtradicie dum la Germana Esperanto-Kongreso. Ni dankas al GEA pro la spaca, trankvila kunsidejo en la kongresejo kaj al kaj LKK (ĉefe al nia kolego Bernhard Schwaiger) pro la bona prizorgado.
AGEI-prezidanto Zsófia Kóródy prezentis la jarraporton (legu aldone), kasisto Christof Krick raportis pri la financoj. Nia asocio havas iom da rezervo, kiun ni ŝatus utiligi por la subteno ekz. de fakaj eldonaĵoj kaj instrurilataj agadoj en Germanio. La raportoj estas troveblaj ankaŭ sur la hejmpaĝo de la asocio http://esperanto.de/agei. La kunvenintoj akceptis la jarraporton. Poste sekvis diskutado, informado pri Esperanto-instruado en lernejoj kaj aliaj kursoj.

**2. Ŝanĝo en la estraro**
La estraro de AGEI estis reelektita por la sekva du-jara periodo krom unu membro: post la retiriĝo de nia estrarano, Harald Schmitz, dum la kunveno estis elektita nova estrarano, Karin Klose. Ni kore dankas al Harald Schmitz la ĝisnunan subtenon, amikan helpon al la asocio kaj kore salutas la novan koleginon, kiu estas sperta instruistino, de kelkaj jaroj pensiulino, kaj akceptis kunlabori per sia faka subteno ĉefe por la fortigo de ekstermovada informado, kontaktado kun neesperantaj organizaĵoj.

**3. SEP – SEMAJNOJ DE ESPERANTO-PERFEKTIGO**
Jen alvoko de la Germana Esperanto-Centro por somera intensa kursaro kaj instrukapabliga trejnado en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo.
Der Deutsche Esperanto-Bund und wir "vor Ort" möchten im Sommer regelmäßig Esperanto-Sprachkurse in Herzberg anbieten. Das sollen Wochen ohne Lernstress, aber mit Erfolg und viel Spass werden. Wir werden das Lerntempo anpassen und die ggfs. Gruppen aufteilen. Auch Besichtigungen, Wanderungen, gemeinsames Grillen, Gulaschfeier, witzige E-Filme ansehen, Musik hören, Ausflüge in die Region, usw. gehören zum vielseitigen Programm. Es wäre schön, wenn noch viele mitmachen würden. Egal, ob für Starter oder Fortgeschrittene.
Auch eine teilzeitige Teilnahme ist anzuraten.

Wann? **19-26 Juli und 27 Juli – 03 August, 2014**

Herzberg hat eine einzigartige Esperanto-Infrastruktur, z.B. mit einer großen Bibliothek nebst Facharchiv, E-Sonderausstellungen im Museum, esperantosprachige Beschilderungen, mehrere Rundwege mit Esperanto-Informationstafeln, Esperanto-Garten, usw.
Bitte werben Sie mit! Ein Anmeldeformular haben wir in der Anlage. Für weitere Auskünfte sind wir da! Egal, ob Sie im Zelt, einer Ferienwohung oder im 4-Sterne-Hotel in der Nähe übernachten möchten, wir können das gern für Sie vermitteln.
Kun koraj salutoj, Mit herzlichen Grüßen: Peter Zilvar, Zsofia Korody
Aliĝu ĉe: esperanto-zentrum@web.de aŭ per poŝto: 37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6

**4. La KER-ekzameno** – pro manko de sufiĉaj kandidatoj – bedaŭrinde ne okazis dum la Germana Esperanto-Kongreso. Ni jam ofte atentigis pri la graveco de tiu ekzameno, kiu dank' al la kunlaboro

inter UEA kaj ITK (ŝtata ekzamencentro en Budapest, Hungario) ofertas modernan internacian ekzamensistemon laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro, kiu certigas kompareblajn nivelojn, unuucan kapablo-mezuradon por ĉiuj lingvoj.

Mi ŝatus daŭre instigi ĉiujn gekolegojn: bonvolu laŭeble eluzi estontajn ekzameneblojn kaj akiri la KER-diplomon, internacian atestilon pri la lingvaj kapabloj en Esperanto.  kiu povas eĉ bone aldoniĝi al la propra biografio. Per propraj ekzamenspertoj oni povas pli bone prepari siajn lernantojn al trapaso de ekzameno, kiu povas esti por ili motivigilo, bona atingcelo. La UEA/ITK ekzamenoj estas trapaseblaj en B1, B2 kaj C1-niveloj. Estas planoj ellabori iam ankaŭ la A2-nivelon.

**5. Mallonga raporto pri Grundtvig-projekto**
Alvenis al duontempo la kvar-landa internacia Grundtvig-projekto, en kiu Germana Esperanto-Centro – Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo kunlaboras kun partneroj el Hungario, Nederlando kaj Pollando. Ĝia titolo estas: Multkultureco kaj multlingvismo en Eŭropo – kiel lerni pri ĝi? Ĝi daŭros ĝis somero 2015 kaj ricevas subvencion de la Eŭropa Komisiono enkadre de la Dumviva Lernado Programo. Post du sukcesaj kaj tre interesaj renkontiĝoj, unue en Pollando en januaro 2014, poste en Nederlando/Frislando en majo 2014 jam estas planata la tria kunveno, seminario en Hungario inter 11-14 septembro. La projektenhavo, la laŭmonata agadplano, raportoj pri eventoj kaj rezultoj estas legeblaj sur la informpaĝaro http://kulturdiverseco.esperanto-urbo.de

**6. TORPEDO 9: 03-05 oktobro 2014**
Post unujara paŭzo (pro la ILEI-konferenco en julio 2013) denove okazos la Tradicia Oktobra Renkonto Pedagogia en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo. La celo estas pluklerigado per fakprelegoj, traktado de interesaj fakaj temoj, diskutado pri tendecoj, ebloj, novaĵoj de instruado de fremdaj lingvoj, ebligo de  spertinterŝanĝo al gekolegoj, helpo per metodikaj-didaktikaj konsiloj al la malpli spertaj gekeolegoj, ktp.

Ĉeftemo: Libroj – Bildoj – Filmoj. Instruado per modernaj metodoj al moderna klientaro.

Kotizoj: 30 EUR (EGS-membroj), 45 EUR (GEA-membroj), 60 EUR (sen membreco), sen kotizo por GEJ-membroj. Aliĝu al TORPEDO 9 ĝustatempe!

TORPEDO estas organizata jam la 9-an fojon de AGEI kaj Germana Esperanto-Centro – Filio de GEA por Klerigado kaj Kultruo kaj la partopreno en ĝi kalkuliĝas ankaŭ kiel studmodulo en la klerigsistemo, do eblas akiri kreditpoentojn.

Detaloj pri la klerigofertoj, studmoduloj: http://ic-herzberg.de/page.php?pid=81093452

La interesaĵo de la ĉi-jara pedagogia-metodika seminario estos la tiam okazonta Herzberga **Esperanto-Filmfestivalo la 4-an de oktobro, ekde la 19-a horo** en la Kavalira Salono de la Welf-kastelo, en kiu pluraj etfilmoj, videaĵoj estos prezentataj ne nur por Esperanto-partoprenantaro, sed ankaŭ por germanlingva publiko. La spektantoj mem prijuĝos la filmojn kaj la plej bonaj en la konkurso ricevos valorajn premiojn.

Multajn salutojn, agrablan someron, ripozadon dum la ferioj,

Zsófia Kóródy
prezdanto de AGEI